

Hans Christian Andersen,

Jutlando

tradukita de Frederik Skeel-Giörling

1. Jutland' kuŝas inter maroj
 kiel granda runbaston'.
 Runoj estas tombegaroj
 meze de arbara kron'!
 Sur erikejo revas ni
 en silenta fantazi'.

2.

3. Sur la vastaj teroj floras
 erikeja arbustar;
 flortapiŝo bonodoras
 dolĉe vasten tra kampar';
 sed nun baldaŭe ĝia bril'
 malaperos sub plugil'.

4.

...

5. Jutland' kuŝas inter maroj
kiel granda runbaston',
pri pasintaj mil' da jaroj
nun rakontas ĉiu ŝton'.
Al estonteco el la mar'
sonas laŭte himna klar'.

*Traduko de la Dana poemo "Jylland" de HANS CHRISTIAN ANDERSEN (Johano Kristiano Andersen', *1805-04-02 – †1875-08-04) en la Danan de FREDERIK SKEEL-GIÖRLING (*1876-02-11 – †1910-10-14).*

Arg-344-690 (2006-02-15 09:38:39)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en la libro "Esperanto-Sangbogen", eldonita en 1941 de "Dansk Arbejder Esperanto Forbund" kaj "Dansk Esperanto Selskab". En la lasta strofo mi metis nur punkton post la vorto "ŝton" kaj mi anstataŭigis la vortojn "himno klar" per "himna klar". En la tria strofo mi anstataŭigis la vorton "malaperas" per "malaperos". La dua kaj la kvara strofoj mankas en la traduko, kompare al la dana-lingvo originalo.